3.a JARO N.o 29 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 1 JANUARO 1938

# Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

## TERUEL!

Teruel estas abrupta ĉefurbo de unu el la tri provincoj de la antikva regno de Aragono, kun nordokcidenta situo apud la Valencia regiono. Ĉe la eksplodo de la faŝista ribelo, pro perfido de la provincestro, malgraŭ vigla kontraŭstaro de la civitanaro, la garnizono el civilgvardistoj venke hisis la flagon de la abomeno k baptis la faŝistan reĝimon per publika ekzekuto, sur la pavimo de la ĉefa placo, al ĉiuj iome reliefaj popolfrontaj personoj.

En Valencio, tuj post abortigo de la militista komploto per aisalto en la kazernojn, la popolo, ankoraŭ sen regula komando, flaris la danĝeron de la faŝista kojno de Teruel, kies influo etendiĝis tuj tra la tuta najbara provinco. La unuaj milicoj, kun plej kuriozaj kostumoj, per plej strangaj armiloj, sur plej diversaj veturiloj, ekvigligis la ŝoseon survoje al la konkero de Teruel. Apenaŭ ĉe la rando de la provinco, jam siblis la kugloj. Vilaĝon post vilaĝo regajnis sinsekve, por la Respubliko, la entuziasmaj k heroaj milicanoj. Sed... la marŝo estis daŭra nur ĝis la pordoj de la sklavigita urbo, kies ĉirkaŭanta ĉeno de montegoj estis, por la faŝistoj, potenca natura fortikaĵo. La milicanoj, kun privataj komandoj, laŭ partio aŭ sindikato, preskaŭ sen artilerio nek aviadiloj, devis halti avare defendante la akiritajn poziciojn. De tiam, tiu fronto stagnis. Du aŭ tri subitaj ofensivoj ne sukcesis; k Valencio, tria ĉefurbo de Hispanio, ĉiam havis en la dorso la minacon de la pinto de tiu kojno de Teruel je unu proksimuma distanco de cent kilometroj.

La spertoj de aliaj frontoj ankaŭ estis instruaj por tiu sufiĉe kvieta sektoro. La Registaro, iom post iom, akiris aŭtoritaton por aranĝi taŭge la militajn servojn. La izolitaj grupoj de milicanoj transformiĝis en disciplinitaj brigadoj. Kaj nun, 15. Decembro, post serioza k tre scienca studo de la situacio; post konvena apliko de ĉiuj necesaj elementoj, la Centra Stabo de la Popola Armeo ordonis ĝeneralan ofensivon kontraŭ la faŝista citadelo. Tiel perfekte ekfunkciis la koncernaj aparatoj, tiel kuraĝe batalis la soldatoj, malgraŭ neĝo k frosto, ke jam nur ses tagoj poste—21. Decembro 1937.—spite al furioza rezisto; spite al tre imponaj baroj, kun tre malmultaj vivoperdoj, eniris venkantaj—finfine!—en la urbo de Teruel, multaj el tiuj, kiuj, dum la longega daŭro de dek kvin monatoj, nur povis ĝin pasive rigardadi de ekstere...

La urbo jam spiras normale, sen la premo de jugo kun sagoj—emblemo de la hispana faŝismo—Niaj soldatoj plibeligas siajn venkojn per kontrasto kun la metodoj de faŝistoj en similaj cirkonstancoj. Se la teroro estas dio de la invadintoj, la kompato estas muzo de la liberigantoj. Tial, la unuaj zorgoj de niaj armeestroj, post ekokupo de la urbo, celis eviti suferojn al la civila loĝantaro, honore aliĝinta denove en la registron de la Respubliko.

Ankaŭ ekstere de Hispanio, en la intrigemaj salonoj, kie la rajton oni mezuras, ne laŭ pravo de argumentoj sed nur laŭ pezo de perforto, nia ĵusa venko kolektas poentojn. Sed la kresko de pli aŭ malpli dika kvanto da hipokrita simpatio, en la kajeroj de kelkaj diplomatoj, ne multe gravas al nia popola pasio. Por la hispana temperamento, estas treege pli agrabla la plaĉa ekkrio de milionoj da homaj estaĵoj, en la tuta mondo, por kiuj la ĉefurbo de Teruel estis, oportune, la plej dolĉa kuko en la solena Kristnasko de la ĵus velkinta jaro...

Ni jam ekgustumas mielon, kvankam sobre ni administras la dozon k rapide akumulas energiojn por la proksimaj eventoj. Teruel, strategia urbo, jam estas nia! Nia... k via, amiko internacia, ĉar ni gajnis ĝin por la libera Hispanio k por la demokrata mondo. Se Teruel estas la fundamento de nia kolektiva idealo, helpu nin do, vi ankaŭ, en la utila tasko finkonstrui la domon!

Kaj ĉiu briko tute taŭgas por masoni muron...

## KRONIKO PRI LA PARADOKSO DE DOLORO KUN BONA HUMORO

Al la redakcio ĵus venas kamarado el la fronto de Teruel. Lia retino ankoraŭ konservas drastajn scenojn pri la apoteoza rekonkero de la aragona urbo. Kun balbutoj en la voĉo, li rakontas k rakontas. Kvankam ne fremdaj al lia arda emocio, en nia menso, faras pli grandan impreson kelkaj specialaj detaloj, kiujn ni penas ordigi por anekdote prezenti, al nia vasta legantaro, psikologiajn trajtojn de popola hispanismo, dum la plej favora ĉapitro de nia kruela milito kontraŭ la Faŝismo:

En la Seminario de Teruel, la faŝistoj rezistas. Kontraŭ la ŝtona domego la tankoj muĝas; ĉiu bleko estas fulmo, kies subita lumo malkovras la popularan k dikan figuron de Indalecio Prieto, socialista ministro por la Nacia Defendo, kiu persone partoprenas k rekte kontrolas la bravan ofensivon. Apud kanono, ĉirkaŭ tanko, sur trotuaro de la unuaj stratoj, la ministro—sen ia eskorto—staras k observas. Oficiroj k soldatoj senceremonie preterpaŝas survoje al urĝaj taskoj. Kiel protagonistoj de sama epopeo, nek la ministro nek la popolo, antaŭ la devo, atentas pri kategorioj. Nia tragedio estas supera kurso de aŭtentika liberalismo k amuza fontano de sprita humoro, kiun la hispana popolo scias ĉerpi, dum la plej malfacilaj aŭ plej decidaj situacioj. Hazarda koincido liveras tipan ekzemplon, kiun ni elektas, kiam rakontas nia kamarado pri unu kamparana soldato, kiu aroge k solene, en serioza mieno, promenas antaŭ la dika ministro, kun nova tuboĉapelo sur la kapo... La bildo estas karakteriza: Peza tanko vomas fajron, je kelkaj paŝoj meditas la ministro de la Armeo k, kiel ĉefa rolulo de la improvizita filmo, inter ambaŭ—ministro k tanko—aperas tiu bruna vilaĝa soldato, alta k bonanima, kun tro naiva heroeco, kiu, por ŝerce primoki la kuglojn de la riĉaj sinjoroj, prezentas sian kapon kun paradoksa celitaĵo el nigra tuboĉapelo de kapitalista diplomato...

En ĉiu milito okazas kuriozaj epizodoj sed, laŭ nia scio, ankoraŭ neniu je tiel demokrate verkis kune gravan paĝon de la moderna Historio, sur la sama amplekso de kelkaj kvadrataj metroj: tanko, kiu pafas; ministro, kiu staras k soldato, kiu montras sur krispaj haroj la brilan tubon de ceremonia ĉapelo. Laŭ tia signo ni ekpaŝas entuziasme k plenespere sub la portiko de la nova jaro!

# SINDONO DE LABORISTINO

Jen sceno, kaptita en modesta kvartalo de Valencio. Ĝi pruvas, lakone sed elokvente, la spiriton de popolo, kiu volas venki. En oleomagazeno, dum plena laboro, eniras popolanino modesta, maljuna, kiu demandas:

—Kial oni ne disvendas oleon?

—Nu, jes; oni ricevis en la urbo kvanton da tro acida oliva oleo, netaŭga por kuiri k manĝi. Nun ni rafinas ĝin k tre baldaŭ oni ĝin vendos, eĉ se ĝi ne estas tre bona.

—Kaj kiam ni havos bonkvalitan oleon?

—Tio ja tre multe malfruos.

—Ĉu tia oleo ne plu ekzistas?

—Jes, ĝi abundas, sed la registaro bezonas ĝin.

—Ho ve, mi neniam aŭdis, ke oleo utilas por fabriki municion.

—Jen, kamaradino. Kvankam strange, oleo transformiĝas en armiloj k municio, ĉar pere de ĝi la registaro akiras eksterajn valutojn, per kiuj oni aĉetas militmaterialon.

Kaj la bona virino, plaĉe surprizita, kun interna ĝojo, elparolas simple:

—Tiuokaze, ni devas ĉiuj konsenti kontente. Ni ĉiuj devas elporti oferojn por ĝui poste ripozon.



Lazaro Cardenas, demokrata civitano, kun indiana sango, k digna Prezidanto de Meksikio, la amerika hispanida lando kiu publike kelpis nian popolon, kiam la falsaj demokratoj ekkovis la feton de la Ne-Interveno. Tiel vera demokrato estas Cardenas, ke li jus rifuzis leĝon, kiu donis kroman povon al la prezidanteco.

Hispanio verve lin salutas!

# KUNDENSIGITA SAĜO

La socialdemokratoj estus tre malsaĝaj, se ili aspirus fariĝi sufiĉe senofendaj por ne esti enkalkulataj inter la komunistoj.

DE BROUCKÈRE
Prezidanto de la Socialista Laborista Internacio

Socialismo ne estas io alia ol konscia volo de homo, kiu akceptas por si la devon ne deturni sian rigardon al la metafizikaj utopioj, kiuj neglektas la plej urĝajn postulojn de la materia vivo. Vera socialisto staras kune kun ĉiuj aliaj homoj, kiuj volas doni, al la surtera kolektiva k socia vivo, humanan sencon!

THOMAS MANN

# POR EVITI MISKOMPRENON

Ĉe la akcepto al nova franca ambasadoro, la Prezidanto Azaña diris: «Tuj post kiam la pafiloj silentos la hispana popolo, en plena ĝuo de siaj rajtoj, estos kunvokata por esprimi sian volon. Tio, kion ĝi decidos, nepre efektiviĝos». Meditu pri tio tiuj, kiuj kredas la insidojn pri truda stariĝo de ia aŭ alia reĝimo, en nia lando. Hispanio nun batalas en la frontoj k laboras en ariergardo por likvidi la rabistojn. Poste, la kolektivaj deziroj jam elektos la regulojn de sia paca kunvivado.

# LA UNUA DEKLARO DE LA MINISTRO POR NACIA DEFENDO, INTERNE DE TERUEL, ESTIS...

«La plej profunda impreso, kiun mi spertis laŭlonge de ĉi tiu kruelega milito, estis pro tiuj miloj da viroj, virinoj k infanoj, elirantaj el la urbo tra la ŝoseo. Tiu homa fluego streĉis la koron, sufokante la ĝojon pri la venko. La tragika silento de la amasa karavano, en mezo de la nokta mallumo, estis rompata de la angoraj singultoj de virinoj k de infanaj voĉetoj, kiuj vokis siajn patrinojn. Tiu spektaklo elvokis ĉe mi la doloron, kiu postsekvas ĉiun militon k mia konscienco sentis sin trankvila, ĉar mi estas fremda al ajna respondeco pri la katastrofo, kiun elportas Hispanio. Se mi estus iu el la provokintoj de la milito, mi estas certa pri tio, ke kiam mi ekgustumus la mielon de la finvenko, mia spirito estus premata de terura konscienca riproĉo pri okazigo de tia krimo, kiu postlasos en nia lando longan voston de doloroj k ruinoj. Al tiuj, kiuj ribeliĝis en Julio 1936, neniam la Historio donos sian pardonon!

Dum la unuaj tagoj de la atako neĝis intense; la vento blovis malvarmege. La vetero ja estis terura. Mi kredas, ke iu ajn alia trupo el la mondo ne estus povinta batali sub samaj kondiĉoj. En la observejo, kie mi rigardadis la antaŭenmarŝon, ne eblis resti pli ol du minutojn liberaere, ĉar la ventego malhelpis tion.

La sukceso de nia Armeo sendube pruvos ilian eraron al tiuj kiuj, ĉi tie k eksterlande, konsideris la Hispanan Respublikon tuj mortonta, ĉar ili kredis, ke la Respublikana Armeo ne kapablis ataki sukcese. Tion proklamis la faŝista propagando, al kiu fidis certaj simpluloj, kiuj ne tute forestas en larĝaj zonoj de la eŭropa politiko. Ni havas taŭgajn soldatojn, kies forto multobliĝas dank' al ilia fido al nobla idealo. LA RESPUBLIKANA ARMEO BATALADAS NUN KIEL ŜTORMTRUPO DE LA EŬROPA DEMOKATIO, KIU NEPRE DEVAS AGNOSKI TIUN ĈI FAKTON.

Tion diris k-do Prieto, ministro de Hispanio.

# ĈU DOGMO, STULTECO AŬ TIMO?

Kontraŭbatali la tiranion estas devo de ĉiu liberecana spirito. Por dishaki la tiranion, malmulte gravas la landlimoj. Tamen, tiel multe paroladas la Demokrataj Registaroj pri «respekto al la internaj reĝimoj», ke oni ekpensas ĉu tiu respekto estas iu el la dogmoj, kiujn la demokratoj konservas tabue, kvankam la tempo transformis ilin je ŝtonoj, pendigitaj ĉe la kolo de la Demokratio. Ekzemple, dum la vojaĝo de S-ro Delbos, li multe konversaciis diplomate kun siaj kolegoj de la vizitataj landoj. Kaj refoje oni aŭdis viglajn deklarojn, pri tio, ke «oni celas amikecon kun kiu ajn lando, senatente al tio, kia estas ĝia interna reĝimo».

La faŝistaj ŝtatoj, intertempe, ne ĉiam observas la saman principon. La kazo de Hispanio estas sufiĉe instrua. Permesi al Germanio k Italio militistigi la malkontenton de mil potenculoj, en Francio, k ne armadi responde la indignon de milionoj da proletoj, en Germanio k Italio, kio estas?

Ĉu dogmo, stulteco aŭ timo? Probable, nenio el ĉio ĉi. Klasa spirito, de kapitalista klaso al kies tento niaj laboristaj kamaradoj ne povas aliĝi sen perfido.

# APOSTOLO DE LA SOCIALISMO

En Madrido, antaŭ 12 jaroj, milde mortis Paŭlo Iglesias, fondinto de la Hispana Socialista Partio k ĝia sola deputito, dum longa periodo, en la reakcia Parlamento de la Monarkio. Modesta k zorgema tipografia laboristo, li estis krom tio, ekde sia juneco, nelacigebla pioniro por la marksismo, kies doktrino akiris grandan prestiĝon, en kelkaj industriaj urboj k en Madrido, pro la nekoruptebla agado de tiu ĉi apostolo, kies maljuna aĝo estis ornamita, en la intimeco de la socialistaj vicoj, per la karesa titolo de «Avo». Bedaŭrinde, li mortis en decembro 1925. antaŭ ol la proklamo de la Respubliko, por kies reĝimo li multe klopodis, kiel saĝa rimedo por postaj avantaĝoj. Nunjare, en la popola zono de Hispanio, ĉiuj partioj k sindikatoj senescepte ĵus honoris la memoron de tiu fervora batalanto por la paco k feliĉo. Ĉiuj gazetoj laŭde prezentis diversajn aspektojn de lia vivo, nobla k senmakula. Ni mem, kiel esperantistoj k popolfrontanoj, montras omaĝe la delikatajn liniojn, kiuj desegnas la bildon de Paŭlo Iglesias, kiu proksime je la morto ankoraŭ ekprovis lerni nian lingvon, ĉar ne vane li forĝis la devizon, kiun ni tre ŝate akceptas, kiel normon de publika konduto en la 12.ª datreveno de lia materia k bedaŭrinda malapero, por nia antifaŝista k esperantista movado:



**PERSISTO ESTAS VENKO!**

# ALVOKO

## AL LA LABORISTAJ ESPERANTISTOJ TRANS LA HISPANA LIMO

Gekamaradoj!

Terure furiozas en Hispanio la faŝistoj. Senkompate ili ĵetas mortigantajn bombojn en urbojn k vilaĝojn. Per tio pruvas la faŝistoj, ke ili ne havas alian solvon ol ĉion detrui. La celo de tiuj kruelaj k barbaraj bomĵetadoj estas detrui ĉiajn propraĵojn, mortigi kiom eble plej multe da viroj k terurigi ĉiujn aliajn.

Kiuj ne mem travivis tiajn bombardadojn, tute ne kapablas imagi ties efikon. Dum k post bombardadoj, helpemaj soldatoj, kuracistoj, laboristoj k. t. p. kuregas, nenion timante, al detruitaj domoj el kiuj eliĝas kortuŝantaj krioj k helpovokoj. Malesperintaj patrinoj serĉas infanojn, infanoj serĉas gepatrojn, fratojn... Nepriskribeblaj scenoj sin montras; sur tero kuŝas disŝiritaj korpoj...

Gekamaradoj trans nia landlimo! Ĉu vi legis pri infanoj mortigitaj en Barcelona lernejo? Ĉu vi aŭdis pri 50 mortigitaj infanoj en Lerida? Ĉu vi scias, ke per faŝistaj bomboj miloj da infanoj, virinoj k maljunuloj pereis en Madrido, Albacete, Almerio, Valencio k aliaj urboj? Ĉu vi scias, ke ĉi tie la faŝismo mortpafis milojn da klaskonsciaj laboristoj, kiuj defendis la demokratan Hispanion? Ĉu vi scias ĉi ĉion? Kion do vi faras?

Ĉu vi volas, ke faŝistoj furiozu ankaŭ en via lando? Ĉu vi volas, ke viaj infanoj, gepatroj k edzinoj estu same disŝiritaj k mortigataj per faŝistaj bomboj? Ĉu vi volas, ke via domo estu detruata kiel ĉe ni en Hispanio? Ĉu vi volas fariĝi viktimo de tiu barbareco, suferi tion, kion ni suferas? Ĉu vi volas, ke via lando estu nova konvulsianta Hispanio?

Ne, gekamaradoj! Ne! Ne! Tute ne!

EKSTARU KAJ AGU ENERGIE

Kiun mision devas plenumi la klaskonscia esperantistaro? Ne perdu senutile vian tempon, ne dormu, ne revu; laborista esperantisto ĉiam estu ankaŭ laboranta esperantisto. Ĉiuj Grupoj kunvenigu siajn membrojn. Ellaboru praktikan laborplanon por temo: «La danĝero de l' Faŝismo k helpo al antifaŝistaj batalantoj en Hispanio». Tuj realigu la decidojn, partoprenu ĉiujn kunsidojn, aranĝu vi mem disvastigojn de la vero. Ĉesigu fratbatalon interne de laboristaro!

En Germanio, la Faŝismo venkis dank' al la laborista malunueco...

Vivu Esperanto en la servo de liberigo por la internacia laboristaro!

E. B.

Germana esperantisto batalanta en Internacia Brigado

# PABLO DE LA TORRIENTE

Pablo de la Torriente estis ĵurnalisto. Li apartenis al tiu kubana junularo, kiu renversis la diktaturon de generalo Machado. Pablo de la Torriente partoprenis aktive en la lastaj politikaj bataloj de Kubo, pro kio li konis ĉiujn karcerojn de la maĉadista diktaturo.


Li venis al Hispanio, kiel militkorespondanto. Li verkadis siajn raportojn en la tranĉeoj mem, trakurante tiamaniere ĉiujn batalfrontojn de Hispanio. Kiam la faŝistoj alproksimiĝis al Madrido, Pablo de la Torriente forlasis la plumon k fariĝis milita komisaro por la unua vico.

Iu leŭtenanto de lia kolono, kiu estis kun Pablo dum tiuj tagoj, rakontas kiel Pablo de la Torriente mortis: Sur supro de monto k interne de kabano, la atakantaj germanoj lokigis maŝinpafilon, kies senĉesa pafado malebligadis la antaŭeniradon de niaj soldatoj. Pablo kun la leŭtenanto k dek soldatoj sin ĵetis al la konkero de tiu kabano. Kiam ili supreniradis la monton, faŝista kuglo trafis la koron de Pablo. La leŭtenanto kaŝis lin malantaŭ ŝtono k daŭrigis la atakon, kiu daŭris du tagojn, ĝis kiam niaj trupoj sukcesis repuŝi la malamikon.

Pablo mortis heroe, kiel mortas ĉiuj komisaroj. En la Divizio ĉiuj liaj kunbatalantoj memoras pri Pablo k lia bildo pendas sur la muroj de multaj Brigadoj, kiel omaĝo al tiu, kiu sciis okupi sian postenon kontraŭ la germanaj invadintoj, kiuj pretendis fanfarone konkeri Madridon.

Rikardo KILES

Centra fronto, 20-12-937.



La seruro de la Ne-Interveno

(Originale desegnita de leganto el Svedio)

**La rekonkero de Teruel estas agrabla simptomo por la nova jaro...**

### POST LA REKONKERO DE TERUEL

# KION VI DIRAS NUN... KAVALIROJ?

Vi havas okulojn k vi ne volas vidi; vi havas koron k vi ne aŭskultas ties batojn; vi havas saĝon-k, por kio ĝi taŭgas?

Vi konsideris nin tuj mortontaj; vi jam pretigis la nigrajn vestojn por ĉeesti nian entombigon, kiu... ankaŭ estus la via!

Dum du monatoj, vi studis la movojn de la perfiduloj. Dum du monatoj, vi flaris minacajn planojn. Dum du monatoj, vi atendis nian agonion sub la abomena hakilo de la faŝista ekzekutisto.

«Kion vi faros, se Asturio pereas?» vi demandis al nia ĉefministro en Ĝenevo. Kaj la doktoro Negrin, forta per propra forto, kun forto de la reprezentata popolo, respondis serene: «Kion ni faros? lukti ankoraŭ ĝis la venko!» Tio nur estis nia vero, k tamen tio ŝajnis al vi fanfaronaĵo. Kaj nun, kio ŝajnas?

Vi ebenigis la vojon al la ribeluloj. Vi regalis ilin per komercaj agentoj. Egoisme, vi rajdigis vetlude viajn interesojn sur la dorso de fiera aristokrata ĉevalo. La ĉevalkurado estas via plej ŝatata sporto. Vi multe scias do pri ĉevaloj, sed vi tute ne scias pri homoj; vi scias nenion pri aŭtentika popolo!

La perdo de la Nordo ne estis nia fiasko; estis la via! Tie, ne restis venkita la Respubliko; tie nur kuŝis kelkaj turmentitaj grupoj da respublikanoj. Martiroj ili estis pro via eraro, pro via flegmo, pro via «neŭtraleco».

Ni tion ripetis senĉese, k vi tion ne kredis: Bilbao, Santander k Gijon ne estas konkeritaj de la italoj, sed renversitaj de la militaparatoj de Germanio. En duelo, inter ĝiaj viroj k la niaj, la rezultato estus ja tute malsama. En lukto, inter heroa persono k potenca maŝino, la persono falis venkite. Germanio liveris siajn ŝtalajn vulturojn. Francio ne permesis flugi, tra sia ĉielo, al niaj defendaj birdoj. Tial okazis la murdo al Baskio k Asturio. Vi estis splenaj rigardantoj de la abomeno. Vi helpis la krimon tra la hipokrita prozo de la absurda Komitato pri la Ne-Intervenol

Kiu asertis tiel stulte, ke estis fabelo nia diro pri la geografia fatalo? Ho, se la Nordo estus havinta aviadilojn—nur la aviadilojn, kiujn sendis tien la Registaro!—en Bilbao, certe ne ekzistus nun la italaj flagoj ĉar, en la ĉefurbo de Baskio, ankoraŭ flirtus la trikolora standardo de Hispanio.

Sed, aŭskultu; jes! aŭskultu vi mem:

Hodiaŭ estas ĝoja tago por ni. Teruel, la valora strategia urbo el Aragono estas bravege k lerte rekonkerita! Tamen nia ĝojo ne petolas nur pro tio; multe pli grava estas la fakto, pruvita antaŭ la mondo, ke ni jam posedas taŭgan instrumenton, kun disciplino k heroeco, kun trafa komando k konscia obeo:

La Popola Armeo!

Sed, en mezo de nia ĝuo, doloras ankoraŭ tro multe la vundoj, kiujn vi faris en nia korpo k en nia animo. Ankoraŭ suferas, pro via kulpo, sklavigitaj provincoj en la Nordo k en la Sudo...

Ni estas pretaj ankaŭ liberigi ilin. Videble aperas, kun nia kuraĝo, nia kapablo tion efektivigi. Teruel estas heroldo de postaj sukcesoj. Ni ekmarŝas, sur pli glata vojo, kun la penso al ĉiuj fratoj ĝemantaj sub teroro de tradiciaj malamantoj. Ĉiuj ricevos finfine la kareson de la libereco, dank' al nia kolektiva penado, malgraŭ la pirata rondo de tiranoj k eĉ malgraŭ intrigo en la fuŝa melodramo pri la intervenanta Ne-Intervenol



GENERALO POZAS

Tre lojala amiko de la popolo k estro de nia armeo en Aragono

Kontraste al la glaciaj diplomatoj, ni estas la varma suko de pasia popolo. Ni estas... Hispanio, la unua lando, kiu, anstataŭ submetiĝi, rezistis, repuŝis k eĉ jam nun atakas ofensive la akumulitajn armilojn de l' faŝismo internacia!

# DIRU TION SENHEZITE...

Andreo Morizet, franca senatano, ĵus faris viziton al Hispanio. Post la vojaĝo li verkis interesajn artikolojn. Unu el la lastaj kronikoj aperis en grava ĵurnalo de Parizo. Ni traduke represas valoran fragmenton:

«Prieto, la armea ministro de la Respubliko, ŝparas konfidencojn pri la milito k pri la materialo: —Ni mobilizis sep kontingentojn k tial ni disponas je duonmiliono da soldatoj, perfekte ekipitaj. Ni eĉ povas mobilizi alian saman kvanton. Ne estas necese. Per tio ni jam posedas rezervojn!

Ni atendas la malamikan ofensivon; jes, tiun vastan ofensivon, kiun oni bombaste anoncis. Ni scias pri koncentriĝoj en diversaj lokoj. Franko ekprovos fendi nian fronton, tra kelkaj punktoj, por ataki forte ĉe la plej malforta. Se li tiam fiaskas, li perdos ĉion! Li scias tion; ni ankaŭ. Sed ni estas certaj ne nur jam pri nia rezistokapablo... Nia brava infanterio estas forĝita sur la batalkampoj. Nia aviado estas supera al tiu de la ribeluloj. Nia faka personaro konsistas nur el hispanoj dum la aviadistoj de Franko, ĉiuj senescepte, estas italoj aŭ germanoj. Ni mem konstruas la aviadilojn k la malpezajn kanonojn. Nur mankas al ni peza artilerio k tankoj. Por tiu branĉo, ni bezonas la servojn de la francaj fabrikoj. Se ni akirus liberecon pri aĉetado, la venko venus tre rapide...

Tiuj ĉi vortoj estas, por mi, kvazaŭ risorto: —Ĉu mi povas tion rakonti?

—Kial ne? eĉ multe pli. Diru tion senhezite, skribu tion sur la fasadojn, se vi volas!

Mi plenumas promeson k aldonas deklaron de la ĉefministro doktoro Negrin:

—Kun ses monatoj de libereco por aĉeti armilojn, la proksima somero estus la fino de la milito kun la fino de la perfido. Se ne, la rezultato estos la sama sukceso, sed post unu jaro, aŭ unu jaro k duono, aŭ eble du jaroj. Tial prudente ni pretiĝas por batali ankoraŭ du jarojn se necese!» La popola energio estas elasta...

# LA ĈEFMINISTRO RESPONDAS AL INFANARO

Grupo da hispanaj geinfanoj, loĝantaj en Parizo, skribis al kamarado Negrin petante bibliotekon k dankis lin post ĝia ricevo. D-do Negrin respondis per tiu ĉi letero:

«Karaj amiketoj: Mi salutas vin pro via skribaĵo, per kiu vi dankis al la Registaro pri la ĵus ricevita biblioteko. La plej bona rekompenco, por tiuj, kiuj okupas sin pri la estonto de nia popolo, oferante sian bonstaton k sian vivon, estos ke vi laboru profitante vian tempon.

Kiam oni naskiĝas, oni prenas grandan ŝuldon al tiuj, kiuj antaŭvivis. Tiun ŝuldon oni pagas nur per konstanta k entuziasma klopodo por plibeligi la estonton de niaj posteuloj. Se vi agas tiel, vi plenumos vian devon k estos bonaj civitanoj. Tiamaniere vi faros servon, ne nur al via lando sed al la tuta mondo k, ĉe la fino de via vivo, vi estos kontentaj pro via helpo al la progreso. La kruelaĵoj de la milito ne nasku, ĉe viaj koroj, malamon sed amon. Homo nobla devas esti forta en la lukto, sed kompatema en la venko. Kaj la finvenko estos nia, feliĉe por Hispanio k por vi.

Kun simpatio, *Johano Negrin.*»

# NEĜO SUR TRANĈEOJ

Unuafoje, ĉi jaron neĝis sur tranĉeojn de Madrido. La mitralilaj nestoj k la ŝtonaj parapetoj kovriĝis per neĝo. De niaj tranĉeoj, oni vidas ankaŭ kiel falas la neĝeroj sur la malamikajn liniojn, dum sur la *nenies zono* etendiĝas brila k blanka mantelo, kie la tutan tagon alrigardas, unuj la aliajn, la kavaj okuloj de fusiloj k mitraliloj...

La nebulo k la neĝo fermas la vojojn k malebligas vidi la pinarbarojn. Forta neĝovento kaŝas pli ankoraŭ la montaron k la ŝoseojn perditajn sub la neĝomantelo...

La soldatoj marŝas malvigle, kun botoj enneĝiĝintaj je ĉiu paŝo. La aero puŝas malantaŭen, k la neĝeroj blindigas la okulojn k pikas la vizaĝon. Tamen, ĉiu faras sian ordinaran vivon. Unuj hakas grandajn trunkojn; aliaj bruligas fajraĵon. La fumo, densa ankaŭ, konfuziĝas inter la nebulo. La fajrokraketado allogas la soldatojn, kiuj sin varmigas ĉirkaŭ la fajraĵo...

Multaj estas kamaradoj, kiuj ne konis ĉi tiun travivadon inter neĝokovritaj montaroj; aliaj naskiĝis en ĉi tiuj malvarmaj regionoj k estas alkutimiĝintaj al la frosto k neĝo; sed, precipe ni, valencianoj, neniam antaŭe estis vidintaj propraokule tiajn mirindajn neĝokovritajn pejzaĝojn...

Antaŭ ĉi tiu ĉarma spektaklo, mi memoras tre ofte al miaj iamaj eksterlandaj korespondantoj, kiuj sendis al mi tiajn bildkartojn kun neĝokovritaj dometoj k arbaroj, vidaĵoj fremdaj por mi, en tiu kvazaŭ fabela tempo, kiam mi ne sciis ankoraŭ kio estas la monstro de la milito...

La densa nebulo k la forta neĝvento aŭguras tre malvarman vintron. Nun ne ankoraŭ estas tute neĝokovritaj la montoj. Elvidiĝas duonnudaj ankoraŭ kelkaj stipoj k kelkaj rokegoj... Alia forta neĝofalo elkovros la montojn k vojojn. Tiam estos necese ekuzi la skiojn por marŝi sur la neĝo... k la milito fariĝos pli peniga... Sed la mondo, laŭŝajne, nenion volas scii pri la *hispanaj ablsenoj*, ĉu ne?

Malproksime siluetiĝas la figuroj kurbiĝintaj de la kamaradoj, dementantaj la neĝon de sur la vojoj... La nebulo, la forta neĝovento, la obstina pluvetado k la lastaj lumeroj de la vesperiĝo, translokigas senvole la penson al niaj malproksimaj hejmoj, al niaj amataj patrino, edzino... ĉar kontraŭ la kredo de multaj personoj, la «ruĝuloj» ankaŭ havas—luktante precize por ili—hejmon, patrinon k gekarulojn, kiujn ni ja deziregus revidi... Ni ne batalas pro emo al batalo... Ĉu necesos klarigi ankoraŭfoje, kial ni batalas?...

Rikardo KILES

Centra Fronto, 24-12-937.

## BONHUMORA FENESTRO


# LA MURDADO, KIEL BELARTO

Klera brita verkisto, Tomaso de Quincey, verkis antaŭ multaj jaroj spritan studon kun tre alloga titolo: «La murdado, konsiderata kiel belarto». Tie, tra aŭdacaj analizoj, aperis konvenaj reguloj k saĝaj konsiloj por murdi elegante. La aŭtoro donis nomon de «Homero je murdado» al iu Williams, zorgema k rafinita londona murdisto, kiu ĉiam uzis frakon por efektivigi sian artan k sangan laboron. Kiam li penetris en ian hejmon, kun tiel estetikaj celoj, neniu restis vivanta. Sendube, li estis heroldo de la faŝista tuteca teorio. Oni devas sincere bedaŭri, ke li jam ne plu vivas por povi en nia tempo diligente ĝin apliki, ĉar la teruraj krimoj de la nuna epoko estus pli belaj, per kelkaj diskretaj nuancoj de la tiutempa eleganteco, kiu tiom multe mankas en la aktualaj murdoj de lertaj disĉiploj. La metodo de Williams, k eĉ liaj saĝaj reguloj, devus nun suferi ŝanĝojn antaŭ la spertoj k pliboniĝoj, kiujn enkondukis, en la utilan arton perfekte mortigi, tiuj, kiuj post la paso de la jaroj poluris la sciencon de tiu speciala Homero je murdado: Mussolini, Hitler k la flava Mikado.

La kondiĉoj de la moderna evoluado, pli dece ol aliam, ofertas konvenajn ŝancojn por murdi pli amplekse k eĉ... kun malplia riskol Kompreneble, hodiaŭ ankoraŭ estas danĝere senvivigi homojn laŭ malgranda skalo. La solena Justeco de la Civilizo rikoltas kelkan sukceson kiam temas puni krimojn faritajn de izolita individuo aŭ de malfortaj nacietoj, kiuj ne povas kalkuli pri la protekto de alia fortika potenco. Sed la pedanta Justeco kun peruko fiaskas bruege kiam la murdistoj estas aŭdacaj k ties ŝajno de forto sufiĉas por difekti la tradician pesilon. Williams, en nia sezono, fatale estus falinta en la abismon de la malsukceso ĉar, krom tiu detalo de la fraka riverenco, li ruĝigis la ponardon nur por sia privata ĝuo, sen la emfaza ŝirmo de kolektiva ŝablono de rabema ŝtato. Certe, al li ne permesus labori, tiel ceremonie, la demokrataj leĝoj nek la faŝistaj dekretoj. Kun pli fuŝa estetiko, sed kun pli efika armilaro, ankaŭ fiaskis Al Capone, pro sama cirkonstanco dum sensaciaj krimoj.

La tekniko de Williams estis tro paŭzema: unue, frapo de martelo sur la nukon; poste, tratranĉo de la gorĝo per tre malrapida ritmo. Vero estas, ke Al Capone enkondukis la raciigadon, en la nobla tasko kadavrigi homojn, per pafoj de mitralilo. Sed tiu ĉi instrumento, kvankam pli konvena ol martelo k ponardo, ne povas absolute fanfaroni post oportuna komparo kun la mirinda detrua maŝinaro, kiun uzas la diverskoloraj faŝistaj ĉemizuloj. Tamen, oni rajtas agnoski, ke por labori sub normoj, kiujn devis atenti Williams k Al Capone por satigi la emon nuligi la ekziston de siaj proksimuloj, oni bezonas pli da kuraĝo ol por fari saman servon laŭ maniero de Mussolini, Hitler k la flava Mikado; ĉar tiuj murdis mem persone, per propra mano, sub risko fali kapte ĉe maŝoj de la polico—kien ili finfine falis—dum la histrionaj asoj de la faŝista krimarto vete ludas nenian personan zorgon; ili havas milionojn da agentoj, kiuj fidele obeas ordonojn; intertempe la interna k ektera Justeco blindiĝis volonte, ankoraŭ pli, por ne perdi hipoteke la rustiĝintan glavon.

Se Williams k Al Capone estus elektintaj gajan flagon k bombastan devizon. Se ili demagoge kolektus, ĉirkaŭ si, naivan homamason lavange helpante iliajn buĉistajn doktrinojn; ili certe estus povintaj senbridigi siajn delikatajn instinktojn, kalkulante ne nur kun la apogo de la faŝismo, sed ankaŭ kun la respekto de la demokratio. Ili ne faris tion! ili preferis ofendi malsaĝe, tro modeste, la reduktitajn zonojn, kiujn la Civilizo gardas plej emfaze por prezenti ŝajnojn de progreso. Williams—eleganta artisto ĝis lasta momento—majstre sin mortigis. Al Capone ankoraŭ nun melankolie meditas en karcero. La glorajn laŭrojn gajnis la rivaloj aŭ la disĉiploj, kiuj, sen bezono riski vivon aŭ liberon, havis la sufiĉan talenton elekti viktimojn k procedojn. Bedaŭrinde, ne estas facile ekscii, kiu el la tri ĉemizestroj meritos plej grandan branĉon de la laŭro, kiam iu faka aŭtoro decidos pri justa alkroĉo de la honora titolo de «Homero je murdado». Povas esti, ke ili tri kune ricevu la nomon de asoj de la krimo; restante la supera ordeno por tiu japana oficiro, kiu, post mortigo de cent ĉinoj, nur plendis ke, pro tio, difektiĝis la klingo de lia sabro de *samuraj*...



PENSOJ DE POPOLA SOLDATO
—Nur ci, bajoneto, estas nun, en Hispanio, garantio de justeco k libereco čar la ĵuro, ankaŭ tre kanajle, perfidas favore al la despotismo...

# La Milita Situacio

Venis la dua vintra etapo de nia milito. Ni scias, tre bone, la nombron k la kvaliton de la trupoj, kiujn Franko povas preni el la Nordo por pliigi siajn fortojn en la Orienta, Centra, Okcidenta k Suda frontoj. Ili ja estas konsiderindaj. Sed ne estas same batali en Baskio, Santander k Asturio, kun kontraŭuloj izolitaj, sen ebla helpo, kondamnitaj per la geografia faktoro al fatala subiĝo, pro la malfavoregaj kondiĉoj, kiel organizi grandskalajn ofensivojn en Aragono, Madrido aŭ Andaluzio. La lojala Hispanio, de la Pirineoj al la marbordo de Granado, formas kompaktan blokon, sub unu sola komando, kun rimedoj konvene lokigitaj, kun siaj komunikiloj funkciantaj regule k normale. Ni povas, same kiel niaj malamikoj, manovri tra internaj linioj. Ni povas, kontraŭstari iliajn batojn—eĉ la plej fortajn!—k rebati ilin niavice kun rapido k energio.

Dum la Komitato de Londono, baraktas en groteskaj diskutadoj pri la «simbolaj» retiriĝoj k pri la kontroloj en la landlimoj, Mussolini rapidigas la alsendon en Hispanion de novaj kontingentoj. Tiucele li uzas procedon, kiun Lloyd George, plej sagaca el la britaj politikistoj, denuncis dum parolado k per sensacia artikolo en *The Manchester Guardian*: La ŝipoj eliras, ŝarĝite per trupoj k armiloj, el Genova k Napoli; la Presagentejo Stefani distrumpetas, ke ili veturas al Libio. Sed pli ol duono da tiuj ŝipoj, apenaŭ preterpasas la markolon de Sicilio, deturniĝas k anstataŭ iri al Afriko ili revenas al Eŭropo, sin direktante al Hispanio.

Estas nun en nia lando pli ol cent mil italoj, ĉirkaŭ dudek mil germanoj, proksimume dek mil portugaloj, francoj, rumanoj, blankrusoj, k. t. p. kun pli ol tridek mil marokanoj. Inter la italoj, estas grupoj da libianoj, eritreanoj, abisenoj k somalianoj.

Jen do, la ŝtormtrupoj, kiujn ni devos alfronti en ĉi tiu dua milita vintro, se ne ŝveligas—kiel estas supozinde—pli da eksterlandaj soldatoj, la vicojn de Franko. Oni aldonu kelkajn regimentojn da legianoj. La cetero estas civilgvardistoj, hispanaj soldatoj el dekunu jarkontingentoj, *reketistoj* k falangistoj, kiujn ni kalkulu je duonmiliono. Ĉi tiuj estas batalantoj de malsupera kvalito, kompare kun la bone ekipitaj k preparitaj invadistoj.

Sed la unua vintro ne plu estas la pasinta vintro. Unu jaro forpasis. Ni jam posedas Armeon! Jes; Armeo, kiu scias rezisti k ataki. Armeo, kiu kuracis sin je siaj infanecaj malsanetoj k estas jam plenaĝa k veterana. Armeo, kiu posedas komandantojn k rezervojn. Armeo, bone armita, kun ŝtala—k konscia!—disciplino.

Franko k liaj mastroj ordonos fari streĉan klopodon. Ili koncentrigos siajn elementojn en, eble du, multenombrajn grupojn; okazos teruraj k sangaj bataloj.

Sed la Hispana Respubliko superos ĉiujn eventojn!

# LA HONORO DE HISPANA NOBELULARO

Tuj post eksplodo de la hispana milito, mult nobeluloj rifuĝis ĉien. Kelkdeko da ili, en la nederland ambasadorejo de Madrido. La nederlanda registar decidis, ke ili devas esti transportataj al Nederlando resti tie ĝis post la milito. Kompreneble, ĉar koncerna nobelularon, oni ne nur gastigeme akceptis tiujn rifu ĝantojn, sed ankaŭ lasis ilin preskaŭ tute liberaj. Unu foje semajne ili devis anonci sin en policejo. Ĉiuj, pos alveno, donis la honorparolon por ne fuĝi.

Post kelkaj monatoj montriĝis ke malgraŭ ĉi ĉio dek kvin nobeluloj fuĝis al Hispanio por aktive parto preni la militon ĉe la flanko de Franko. La nederland regno embarasiĝis ĉar kutime, oni tie revoluciulo nenederlandaj ne akceptas, aŭ nur por enkarcerigi ilin tiom longe kiom estas bezonate por konvinki ilin, k estas pli bone ne resti en tiu lando.

Plej ofte tiuj viktimoj estas simplaj laboristoj, kiu eĉ ne havas sufiĉan vivrimedon aŭ la garantion, kiu sampartianoj donis por liberigi ilin, certigante al l registaro, ke tiuj helpatoj ne bezonas almozpeti, tiu okaze la garantioj ne estas akceptataj.

Kia diferenco! La frankistoj povis tute libere ĉio fari, pro tio ili, per helpo de simpatiantoj, fuĝis, rom pante la ĵuron de l' honoro...

La nederlanda registaro petis al generalo Frank resendi tiujn ĵurrompantojn, sed ne kredu, ke tio balda okazos. Intertempe la pli honorinda parto el la rifu ĝantaro, kiuj ne ĵurrompis estas ŝlosita en neuzata kazerno, en Gorkumo, k tie ili povas pensi gvardit pri la valoro de la ĵuro k mediti pri la malbono kaŭzita de la trompintaj *kamaradoj*.

P. de l' BRETO
Amsterdamo


## NOVA ARGUMENTA BATALILO EN ORIENTO

En Ĉinio, por laŭtigi la veron pri la barbaraĵoj de la japana imperialismo, aperas freŝa Esperanto-gazeto

## AL LA NOVA ETAPO

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI LIBERIGA BATALO DE ĈINIO

Petu senpage provekzemplerojn al la redakcia adreso:

MR. JOHAN H. P. O. BOX 116 CANTON (Ĉinio)



## EĤO DE NIA LASTA TRIUMFO

La Brita Laborista Partio, okaze de la rekonkero de Teruel, sendis al la hispana Registaro jenan gratulan telegramon, kun subskribo de ĝia Plenumanta Komitato:

«Ricevu niajn plej varmajn gratulojn pro la granda venko de Teruel. Ĉiuj amikoj de la libereco, en la tuta mondo, ĝojos pri tiu ĉi nova pruvo ke la hispana demokratio jam komencas premadi la faŝistajn provokojn.» Sekvas la nomoj de ĉiuj komitatanoj.

**Esperanto estas uzata en Italio por la tiranio, sed... nia lingvo ne utilas por blasfemado!**

# MOZAIKO



MARTINEZ BARRIO
modera respublikano
Prezidanto de la
Parlamento

● Nordamerika ĵurnalisto tute prave asertis: «La demokratioj nur estas forte ligitaj por krei interkonsenton pri konstantaj cedoj».

● Monarkia eksministro Goicoechea en San Sebastian, la 22. Novembro, deklaris, ke post Marto 1934, certaj dekstraj partioj en Hispanio, inter ili tiu, kiun li gvidas, planis ŝtatrenverson, kiu eble transformiĝus en civilmilito, se tion postulus la cirkonstancoj. Krome li diris, ke «li k aliaj rojalistoj vizitis Italion por certigi la subtenon de itala registaro k faŝista partio, okaze de eventuala eksplodo de aludita civilmilito». Tio bone pruvas, ke jam du jaroj antaŭ la ribelo, la faŝistoj celis sekurigi al si helpon de itala faŝismo.

● Oni komunikas el Gibraltar, ke dum lastaj semajnoj estis tre aktiva la transportado de trupoj k militmaterialo al frankista zono; ĉirkaŭ kvin cent maŭroj po tago estis transportataj el Ceuta al Algeciras. Tiuj laste alvenintaj estis preskaŭ knaboj. La 2. Decembro alvenis al Cadiz tri ŝipoj ŝarĝitaj per italaj militiloj, eskortataj de tri italaj detruŝipoj k du germanaj submarenoj.

● Okaze de la eliro de Italio el la Ligo de l' Nacioj, komentis nia ministro pri Nacia Defendo: «Estas tre signifoplena fakto ke la anonco de tiu eliro estas farita ĝuste la antaŭtagon de granda ofensivo, kiun Franko preparas k en kiu oni aljuĝas gravan partoprenon al italaj trupoj, kies mobilizon, al elektitaj batalfrontoj, ni registras en la nunaj tagoj. Jam de longe Mussolini montris sian malsaton al la Ligo; tamen nun li rompas ĉian ligilon kun ĝi por havi plenan liberon por elektivigo de siaj celoj rilate al Hispanio, kiel paŝo por novaj k pli vastaj militaj entreprenoj, kiujn diktas al li lia imperiisma soifo. Tiu, kiu ne vidas tion, estas blindigita per sia danĝera stulteco».

● La Ministerio pri Agrikulturo anoncas, ke oni preparas la rikolton de olivoj, kiu ĉi jare estas abundega. La koncerna ministro esprimis sian ĝojon pro la helpo de armeanoj al kamparanoj en ties laboro, apud la bruo k fajro de la frontoj.

● Antaŭ la nigraĉemizuloj kolektiĝintaj «spontanee» en Venezia Placo, Mussolini paroladis jene: «La kaŝaj fortoj manovras en Ĝenevo kontraŭ nia revolucio. En tiuj kondiĉoj ne estas tolerebla la restado de Italio tie. Nia stilo, nia soldata temperamento, nia doktrino, suferas. La minacoj, kiuj eliĝas de tempo al tempo el la GREGOJ de la grandaj demokratioj, lasas nin tute indiferentaj».

## Ribelprovo en Hispana Maroko

El Tanĝero, oni komunikas detalojn pri indiĝena ribelo kontraŭ la faŝistaj aŭtoritatoj. La okazaĵoj dum lastaj tagoj de Novembro en pluraj lokoj de la Protektorato, elpruvas la gravecon de la latenta protesto, kiu montriĝas ĉiutage inter la marokanoj k aliaj indiĝenoj.

En multaj tieaj urboj la interpuŝiĝoj de la indiĝenoj, kun la trupoj de Franko, rezultigis terurajn masakrojn. La polico faras sinsekvajn arestojn. En ĉiuj gravaj lokoj de tiu zono, deĵoras senĉese patroloj, pretaj antaŭ la danĝero de novaj ribelprovoj.

En unu sola nokto, okazis naŭ viglaj manifestacioj el gepatroj de arabaj soldatoj, envicigitaj ĉe la frankistaj trupoj por batali en la metropolo. La protestantoj trakuris tumulte la internacian urbon, kriegante: «For Franko! Franko estas perfidulo! Franko estas murdisto! Franko trompis niajn fratojn, filojn k patrojn!»

Sekve de tiuj okazintaĵoj, granda ekscito regas ĉe la indiĝena k cetera popolanaro.

● En datreveno de la morto de Paŭlo Iglesias, grupoj de soldatoj festis lian memoron per paroladoj ĉirkaŭ la monumento staranta en ĝardeno de Madrido. Malamikaj kugloj zumis intertempe. Tamen la soldatoj daŭrigis; iu komisaro hezitis momenton, sed fine li grimpis sur ŝtonon k diris: «Paŭlo Iglesias meritas, ke mi iom risku». **Bataliona komandanto kriis al la komisaro**: «Tiu estas via plej bona parolado el via tuta vivo!».

● Malgraŭ la terura situacio, kiun kreas la milito, la registaraj instancoj helpe de multaj sidikataj k politikaj organizoj, aranĝas por la komenco de la nova jaro feston por la infanaro. La popolo oferas malavare sian monon en la listoj, kiuj malfermiĝis por aĉeti librojn k ludilojn por la senpatraj infanoj. Oni atentas prefere la infanojn devenantajn el faŝista zono k kiujn oni vartas en adekvataj k komfortaj rifuĝejoj.

● La 20. Decembro estis kaptataj en Gvadalajara provinco, kvar aviadistoj, kiuj okupis aeroplanon, kiu falis apud vilaĝo. Ĉiuj kvar estas germanoj k deklaris, ke ili venis batali en Hispanio obeante ordonojn de sia registaro.

● Fragmente ni kopias noton de Ministerio por Nacia Defendo, rilate al pseŭda blokado de nia marbordo: «La navigacio ne estas malhelpata, eĉ minimume, en tio, kio koncernas la intervenon de ribelaj militŝipoj. Pri la minaco de blokado, pere de submaraj minoj, ĝi estas simpla ideo de bolanta imagkapablo. Nia, jam de longe starigita, servo por kaptado de minoj funkcias tiom regule k perfekte ke ĝi tute garantias la forigon al tia danĝero. Estas saĝe k prudente ne diskonigi la organizformon de tiu efika servo, sed ni prave povas aserti ke, pro longaj monatoj de funkciado, ĝi asekuras absolutan liberon por ŝipveturado en nia marbordo.

● La Prezidanto de la Socialista Partio k de la U. G. T., k-do. Gonzalez Peña, heroa gvidinto de la popola ribelo en Asturio dum Oktobro 1934, kiu estis tiam mortkondamnita de la reakcia registaro, diris en mitingo ĵus okazinta en Barcelono:

«Eksterlande oni faras kalumnian kampanjon kontraŭ niajn dinamitistojn k mi devas diri: Ili alproksimiĝas je kvarcent metroj de la faŝistaj fusiloj, por ĵeti, per propra mano, sian kartoĉon kontraŭ la batalantojn en tranĉeo. Kion vi opinias, pri tiuj, kiuj disĵetas triliton de el senpuna alteco je 4.500 metroj, sur sendefendajn korpojn de malfeliĉaj virinoj k infanoj?».

● Oni devas memori, ke tuj kiam alvenis en Londono, angla deputito Attle diris al ĵurnalistoj: «Ĉio, kion mi vidis en Barcelono, Valencio k **Madrido, forte mirigis min**».

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro | 131'10 | ptoj. |
| F. Ll.—Catarroja | 24 | » |
| K-doj. el Bugarra | 20 | » |
| C. A.—Orihuela. | 10 | » |
| E. M.—Castuera | 5 | » |
| E. H.—Villanueva de Córdoba | 25 | » |
| R. D. (Gordito)—Villanueva de Córdoba | 25 | » |
| E. M.—Madrid | 10 | » |
| P. A.—Madrid | 5 | » |
| J. S.—Albacete | 16 | » |
| J. B.—Híjar | 5 | » |
| E. F.—Barcelona | 5 | » |
| M. L.—Concentaina | 5 | » |
| F. del R.—Baza | 10 | » |
| L. R.—Figueras | 6 | » |
| F. S.—Madrid | 10 | » |
| J. E.—Cardiff. | 1 | ŝil. |
| J. B.—Stockholm | 2 | sv.kr. |
| E. E.—Stockholm | 5 | » |
| N. L.—Falun | 5 | » |
| V. B.—Falun | 5 | » |
| D.—Denpasar | 5 | gd. |
| L. J. R. B.—Rotterdam | 1 | » |
| A. C. H.—Rotterdam | 1 | » |
| J. P.—Breezand | 10 | » |
| J. B. G.—Amersfoort | 5 | » |
| G. B.—Arkel | 0'50 | » |
| G. K.—Amsterdam. | 0'25 | » |
| L.—Amsterdam | 0'10 | » |
| De J.—Amsterdam | 0'21 | » |
| H. S.—Enkhuizen | 1 | » |
| R. P.—Fontenay s/ Bois. | 12, | ffr. |
| F. H.—Gablonz | 10'51 | » |
| G. P.—La Feuillée | 20 | » |
| J. Esperanto.—Fecamp | 20 | » |
| J. L.—Pouy k Grupo de Castelnau | 50 | » |
| M. L.—Le Mans | 20 | » |
| G. H.—Troyes | 5 | » |
| J. M.—Troyes | 5 | » |
| P. Th.—Beauthiel | 5 | » |
| G. P.—Rougiville | 10 | » |
| Th. K.—Trebic | 36'10 | » |
| A. M.—Kuresaare | 40 | » |
| Ĉeĥoslovako | 20'20 | » |
| C. P.—Vaulx en Velin | 10 | » |
| Groupe Esp. Ouvrier—Orleans | 5 | » |
| A. M.—Quessy | 10 | » |
| K. H.—Kopenhago | 65 | » |
| Th. F.—Reykjavik | 120 | » |
| J. B.—Vence | 10 | » |
| J. S.—Trevoux | 10 | » |
| H. L. v Z.—Nice | 15 | » |
| H. B.—Marseille | 10 | » |
| M. G.—Montargis | 10 | » |
| E. J.—Marennes. | 12 | » |
| M. L.—St. Quentin. | 10 | » |
| A. M.—St. Quentin. | 5 | » |
| Lab. Esp. Klu.—St. Quentin | 25 | » |
| O. N.—Stockholm | 71 | » |
| R. G.—Contramoulin | 20 | » |
| B. N.—Podgorica | 17'50 | » |

NOTO.—Kun emocio k danko, ni konfirmas, por kelkaj numeroj, duonmonatecon de POPOLA FRONTO ĉar nia voko pri subteno ne estis vana. Faru vian eblon per regula kontribuo k ni promesas ne disrevigi vin!

LA ADMINISTRACIO

### ANKORAŬ LA PAPERO...

Jes; neeble estis ankaŭ por ĉi tiu numero disponi pri taŭga papero.

Ni jam ne kuraĝas fari promesojn tiurilate. Sciu ĉiuj, ke vigle ni zorgas pri la afero.

## INFORMEJO

### ONI INFORMAS, KE

K-do Leonardo Compañ estas en la batalfronto kun jena adreso: Estado Mayor, 39 División, Alfambra, Frente Teruel.

### ONI SCIVOLAS PRI:

Du nederlandaj kuzoj nomitaj Meijer kiuj venis al Hispanio por aliĝi internaciajn brigadojn, sed ĝis nun ilia familio ricevis neniajn sciigojn.

## KORESPONDADO

**Simpla trilinia anonceto 4 f. fr.**

HISPANIO.—K-dino Angela Cailló, Plaza Viladomat 15, Berga (Barcelona), dez. kor. kun tutmondaj k-doj pri ĉiuj temoj, prefere pri la hispana milito kontraŭ la faŝismo.

HISPANIO.—Grupo da gejunuloj I. L. E. S.-anoj 17-jaraj dez. interŝanĝi korespondadon kun gejunuloj el ĉiuj landoj, pritrakti sociajn temojn k la militon kontraŭ la faŝismo. Adr.: Plaza de Cataluña, 6, Sección Esperanto, Berga (Barcelona).

### POR EKSPOZICIO EN TRANĈEO

Kiun aranĝas niaj amikoj, en la sektoroj najbaraj al Madrido. Oni bezonas leterojn, poŝtkartojn k ĉiuspecan esperantistan materialon.

Pro kompreneblaj kaŭzoj, oni ne povas respondi nek pagi, sed certe ĉia ekspoziciaĵo tre multe utilos al nia movado. Pruvu ke Esperanto vivas!

Adresu ĉion al:

RIKARDO KILES
99 Brigada E. M. 2.ª Sección
Ejército del Centro

## POPOLFRONTA LETERUJO

M. M.—Ciudad Lineal.—Vian leteron de 7-12-937 ni ricevis. Ni dankas k reciprokas vian saluton. Se eble ni publikigos la anekdoton. Ni notis vian novan adreson, kien ni sendos regule la gazeton.

M. L.—Le Mans.—Ni dankas vian monsendon. Via deziro estas transdonata, k se iu k-do. sin anoncas, ni agos konsekvence.

E. E. Y.—Aspremont.—Viajn vortojn al K-do. G. Farenc ni konis k kore ilin dankas, same kiel vian mondonacon. Ni ĉiuj salutas kore vian edzinon k vin, ne forgesante vian helpemon.

D.—Denpasar.—Ni ricevis vian leteron de 1-12-937, kiu entenis bileton, pri kies sendo ni kvitancas aparte k dankegas. Tamen ni devas vin averti ke estus prefere sendi monon rekte al niaj perantoj. Rilate al via deziro, ni petas prokrasti la aferon iomete; nun ne estas taŭga tempo. Bonvolu paroli al ni pri la afero pli poste. Ree ni dankas!

A. J.—Karlstad.—Via letero de 4-12-937 bone trafis nin. Emocie ni dankas viajn kuraĝigajn vortojn. Ni penos resti indaj je viaj esperoj. Ankaŭ ni dankas vian monsendon, kiun ni kvitancos en koncerna rubriko.

V. K.—Omsk.—Ni ricevis vian leteron, sed bedaŭrinde nun ne eblas aranĝi tian servon, kian vi deziras. Ni esperas, ke post malmulte da tempo la cirkonstancoj pliboniĝos tiurilate. Kamaradan saluton!

J. L.—Pouy.—Vian leteron de 8-12-937 ni respondas. Vian deziron rilate al Tanĝeraj k-doj. ni plenumos. Laŭ niaj sciigoj tiu misfaro en la landlimo jam estas aranĝita. La «anonceto» certe jam aperos. Viaj klopodoj k frazoj devigas nin al ĉiama dankemo. Tutkoran saluton k... antaŭen ĝis la venko!

ATENTU! La internacia adreso de «Ĉinio Hurlas» ŝanĝiĝis laŭ jena maniero:
Mr. Tank, P. O. Box, 74-HANKOW (Ĉinio).

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia

## ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

GENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono
GUSTAVE FARENC
55, Rue Brise-Pain
Poŝtĉekkonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandanoj
PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-I
poŝtĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

BELGIO
K-DO M. DELFORGE
33, Rue de Heigne
Postĝiro 139106
CHARLEROI

ANGLIO
K-DO O. MELTON
23 Fowler Str. Nechells
BIRMINGHAM 7

SVEDIO
ARBETAR ESPERANTISTEN
Barnhusgatan 8 ö. g. n. b.
Postĝiro n.° 53411
STOCKHOLM

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA
**POPOLA FRONTO—Mar, 25, Valencia (Hispanio)**